

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando

Esperantobladet

Joulukuu ♦ Decembro

6/1997

Bonan kristnaskon kaj Feliĉan novan jaron 1998!

Baza esperanta literaturo, p. 6-7

Informa Bazarro, p. 11-16

Talvipäiville Kuopioon, s. 16-18

Tiu ĉi numero aperos ankaŭ en Interreto: <http://www.sci.fi/matlah/eaf/e-lehti>

Esperantolehti

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ aorantan@jylk.jyu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@icl.fi

WWW-sivujen taitto/ Enpaĝigo de TTT-paĝoj: *Matti Lahtinen* (osoite alla/ adreso sube).

Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adressanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 600

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Pietiläinen*

Nyyrikintie 4 H 47, 33540 Tampere. ☎ (03) 261 7871 ✉ tijupie@uta.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; työ/laboro: (03) 249 4313

Sekretario/Sihtööri: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Ali-Simola, Friskinkatu 2 A 33, 20360 Turku. ☎ (02) 238 7767

Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609

Matti Lahtinen, Syrjälänkatu 6 B 61, 40700 Jyväskylä. ☎ (014) 615 054 ✉ matlah@sci.fi

Tuula Virolainen, Auringonkatu 8 E 48, 02210 Espoo. ☎ (09) 803 6149 ✉ tuula.virolainen@vtt.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Sylvia Hämäläinen, Teivaalantie 85, 33400 Tampere. ☎ (03) 346 3493

Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ raita.pyhala@lesti.kpnet.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*, Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo.

☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Officejo: Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/aŭtomata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä* (osoite yllä/ adreso supre),

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Jokaisen esperantistin lehti

Nyt on vuosi kulunut siitä, kun aloitin Esperantolehden toimittajana. Lehden teko on mielenkiintoista, yhteydenotot ja yhteiset projektit auttavat ymmärtämään sitä, mikä voima on yhteisellä kielellä, joka ylittää kaikki maantieteelliset, etniset ja muut rajat. Kiitokset kaikille lehden lukijoille ja avustajille, joiden kanssa olen joutunut tekemisiin kuluneena vuotena. Kiitokset kriittisille lukijoille, jotka ovat antaneet ajattelemisen aihetta ja johtaneet aivan uudenlaisiin ratkaisutapoihin, joita en ilman heitä olisi tullut miettineeksikään. Kaikille lehden lukijoille kiitos kärsivällisyydestä, sillä kukaanhan ei ole seppä syntyessään.

Aloittajaiskirjoituksessani toivoin, että Esperantolehdestä tulisi jokaisen esperantistin lehti. Ilahduttavasti tuo sanoma kuultiin, sillä lehteä on avustanut lukuisa esperantistien joukko. Yksi toimittajaparka ei voi olla kaikkialla läsnä, kun jotakin tärkeää esperantoa koskevaa tapahtuu, samoin hän ei voi olla todistamassa jokaista mainintaa esperantosta radiossa, televisiossa tai lehdissä, toimittaja on vain oma itsensä, joka voi välittää laajan esperantistijoukon äänet, selventää sen äänen kuuluvuutta. Siksi toivon ensi vuonnakin yhtä innostunutta osallistumista lehdentekoon.

Hienointa on itse kirjoittaa juttu julkaistavaksi, mutta on myös toisenlaisia osallistumistapoja. Leikkeiden lähettäminen esperantoa koskevista lehtijutuista

olisi todella ilahduttavaa. Samoin voi lähettää juttuvinkkejä, jolloin toimittaja etsii jutun tueksi faktat. Tämänlainen aktiivisuus puuttuu lehemme lukijoilta kokonaan, kun taas päivittäisissä sanomalehdissä juttuvinkkien lähettäminen toimittajalle on melko tavallista. Lisäksi jokainen lehti saa valtavan määrän kommuniqueoita sekä muuta informaatiota, jota lehden toimitus voi käyttää hyväkseen juttuja tehdessään. Yksi tällainen lähde lehdellemme on tänä syksynä 1 vuoden iän saavuttanut Eventoj-lehden interredaktore-palvelu.

Jos arastelee jutun julkaisemista omalla nimellään, voi toki jättää sen tekemisen toimittajan harteille. Tällainen arasteleva avustaja voi auttaa toimittajaa etsimällä faktatietoa jutun pohjaksi. Sitä löytyy paikallisista lehdistä ja muusta kirjallisesta aineistosta, sitä voi itsekin hankkia haastatteleamalla asianomaisia henkilöitä. Tällaista taustatoimittajin työtä harva lehemme avustajista on tehnyt, joitakin kertoja olen sellaiseen kyllä törmännyt lehdessämme.

Myös lehden ulkoasuun voivat valokuvaajat ja kuvittajat vaikuttaa. Kuinka monta kertaa olisinkaan kaivannut todella nasevaa piirrostä tai valokuvaa kanteen, sellaista kuvaa joka olisi pistänyt hiukan veriä kiertämään yllättävyydellään. Mutta kun kukaan ei niitä lähetä, niin ei voi välittää. Kaikenlaiset otokset ja piirrookset ovat tervetulleita, ei tarvitse olla kyse ns.

→

Tempo ne sufiĉas

Baldaŭ finiĝos mia kvara jaro kiel prezidanto de EAF. Dum tiuj jaroj mia vivo multe ŝanĝiĝis, pri kiu atestas ankaŭ tio, ke dum tiuj jaroj mi havis kvin diversajn adresojn. Tamen la direkto de la ŝanĝoj estis klara: pli kaj pli da taskoj, pli kaj pli da diversaj okupoj. Kaj la alia flanko estis: pli kaj pli da supraĵe plenumitaj taskoj, malpli kaj malpli da tempo por veraj hobiaj kaj libertempo.

Kaj tio havas siajn sekvojn. Ankaŭ nun, skribante tiun ĉi artikolon, malfrue kiel kutime, mi sentas partan paralizon de mia esperanta lingvosento kiel sekvo de malmulta legado kaj uzado de Esperanto lastatempe.

Mi estas kontenta kun la evoluo de esperanta agado dum pasintaj jaroj: sukcesa kongreso, novaj oficejoj, novaj agadformoj, i.a. pli aktiva partopreno en diversaj publikaj informaranĝoj, uzado de komputilaj retoj en nia agado. Tamen, se mi

taksas mian propran rolon, mia noto estas maksimume kontentiga. Posteno de prezidanto postulus ne nur formalan gvidon de aferoj, sed ankaŭ tempon por rigardi pli vastajn perspektivojn. Necesus tempo por eksteraj kontaktoj, necesus okupiĝo pri la lingvo por teni la lingvosenton viva.

Parte miaj esperantaj taskoj ankaŭ ŝanĝiĝis kaj faciliĝis, i.a. mi ne plu redaktas gazeton kaj ne havas postenojn en lokaj kluboj. Tamen daŭre mi sentas premon de nefaritaj taskoj, malbone plenumitaj devoj kaj malfacileco elekti, kion fari kaj kion ne fari dum mankas ebleco fari ĉion. Feliĉe mi estas sufiĉe malpenema por ne plene forbruli miajn fortojn.

En labora vivo mi ĝis nun vivis per relative malgrandaj esplorprojektoj kaj plej diversaj kontraktoj. Necesis daŭre fari petleterojn por ricevi financadon pro

rippikuvista, mikä tarkoittaa ammattikielellä tapahtumista otettua ryhmäkuvaa. Kuinka mieluusti aloittaisinkaan Esperantolehden kuva-arkiston kartuttamisen, jos vain löytyisi innokkaita valokuvaajia ja piirtäjiä.

Mitä useampi tekijä Esperantolehden tekemiseen osallistuu, sitä vähemmän sisäpiirit ja muut klikkiytymät voivat pitää yllä valtaansa ja sitä vähemmän jää hampaankoloon sanomattomia asioita. Uskon että jokaisen esperantistin ääni on

kuulemisen arvoinen. Avoimuus keskenämme on myös edellytys sille, että voimme lisätä esperantoliikkeen ulkopuolista kannatustamme. Vaikka jotkin asiat ovat vaikeita päättää ja toteuttaa, tiedottaminen on jokaisen kansanliikkeen venkierto, vaikka joskus vähän kirpaiseekin. Toivon vuonna 1998 yhä useamman suomalaisen esperantistin osallistumista yhteisen lehtemme tekemiseen.

Aimo Rantanen

esplorlaboro, kiun mi sentis mia ĉefa inklinio. La okupiĝo pri tio ne restis senrezulta: mia licencula disertacio pretiĝos printempe kaj ĝi jam estas triona aŭ eĉ duona paŝo al la doktora disertacio. Tamen la laboro havis klaran tempoplanon nur surpapere.

La afero ŝanĝiĝis kiam mi, antaŭ ne longe, komence de novembro ricevis informon pri plurjara financado por mia laboro.

Parte la novaĵo portas al mi pli da tempo: ne necesas daŭre serĉadi novajn monfontojn, sed alia rezulto estas la neceso pretigi doktoran disertacion dum tri jaroj. Temas pri plena streĝigo de fortoj, kiu plenumas plene la laboran kaj grandparte ankaŭ la liberan tempon.

Kiam mi akceptis la prezidantan postenon en jarkunveno en 1994 en Järvenpää, mi estis senlabora kaj pensis, ke mi ankaŭ

longe restos tia. Tamen du monatojn post la elekto mi komencis labori kaj post tio la laboroj daŭris kun pli kaj malpli longaj intertempoj senlaboraj. Feliĉe mi estis mallabora antaŭ Universala Kongreso en Tampere, sed tuj post ĝi atendis min mallongdaŭra esplorlaboro kaj farenda raporto, post ĝi alia kaj tiel plu.

Nun kiam la jarkunveno denove proksimiĝas, mi alvokas la membrojn serĉi nova(j)n kandidato(j)n por la prezidanta posteno. Kvarjara periodo jam superas la mezan longon de oficperiodo de prezidantoj de EAF dum pasintaj 13 jaroj.

Kvankam, verŝajne, mia posteulo estas laŭaĝe malpli juna, mi diras jam estas tempo por pli freŝaj fortoj. Mi pretas, se necese, plu porti la torĉon kun freŝiĝintaj fortoj post sufiĉe longa paŭzo.

Jukka Pietiläinen

Nova finna honora membro

UEA elektis dum la kongreso en Adelajdo kiel honoran membron prof. Liisi Oterma. Ŝi esperantiĝis fine de la dua mondmilito, instigite de prof. Yrjö Väisälä, ŝia instruisto (malkovrinto de la asteroidoj Esperanto kaj Zamenhof), kies posteulo Liisi Oterma estis kiel profesoro pri astronomio en la Universitato de Turku (1962-78). Krom multaj asteroidoj Liisi Oterma malkovris tri kometojn, el kiuj la plej fama estas Oterma (1943). Ŝi

estas ege modesta persono kaj ŝi dediĉis sin al scienca esplorado, evitante estrarojn kaj aliajn postenojn movadajn. Liisi Oterma multe kontribuis al la prestiĝo de Esperanto en sia medio, uzante ĝin en astronomiaj konferencoj kaj sciencaj publikigaĵoj. La skipo de Esperantolehti gratulas Liisi Oterma je honora membreco, speciale tuŝita pro la mencio pri ŝia modesteco.

Vivverkeroj

William Auld:
Pajleroj kaj stoploj.
elektitaj prozaĵoj
 UEA 1997
 ISBN 92-9017-052-2

Omaĝe de jam 50 jarojn daŭranta esperantlingva verkista kariero, aperis la 52-a verko de William Auld. Giganta verkista kariero, giganta vivverko, giganta la nova volumo 342-paĝa. William Auld diras en la antaŭparolo de la nova verko pri ties kriterioj por kompilado: "Niaj multnombraj revuoj tra pli ol jarcento enhavas tre multan valoran materialon, kiu en plimultaj kazoj restas entombigita. Mi do decidis kolekti libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne havas valoron pli ol efemeran".

La libro "Pajleroj kaj stoploj" enhavas 4 sekciojn, nome Eseoj, Rakontoj, Tradukoj sub la rubriko Libro-kulturo recenzoj. Mi persone ŝatis la Eseojn, Rakontojn kaj la rubrikon Libro-kulturo. La lingvo kaj la stilo de la libro estas tiel grandioza, ke mi povas rekomendi ĝin al ĉiuj, kiuj pensas ke ilia vorttrezoro pro variaj kauzoj ne estas granda aŭ pro longdaŭra malintereso de studado de nia lingvo malgrandigita. Tiel maloftaj vortoj abundas en la libro, ke la leganto vere devas peni por kompreni tion, kion la aŭtoro diras.

En multaj eseoj William Auld pritraktas la fenomenon esperantlingva verkisto. Ĉu tiu ĉiam estas nur amatoro? Ĉu la esperantlingva verkisto devus verki ankaŭ en

sia patrina lingvo literature valorajn librojn? Ĉu povas ekzisti originale en Esperanto verkita romano, dramo aŭ poemkolekto, kiu ankaŭ literaturarte plenumas ĉiujn kriteriojn? Ĉiuj opinioj kiuj dubas la valoron kaj esprimopovon de esperantlingva literaturo pulvoriĝas en la manoj al William Auld kiel cindro. Ofte ankaŭ ni Esperantistoj malvalorigas nialingvan literaturon. Sed laŭ Auld ankaŭ ni havas en nia lingvo majstroverkojn.

Sube estas listo 'Baza literaturo', en kiu estas listigitaj la endaj verkoj esperantlingvaj, kiujn ĉiu esperantisto devus koni. Multaj el ili estas recenzitaj en "Pajleroj kaj stoploj".

Baza literaturo

Antaŭ kelkaj jaroj William Auld pretigis la jenan liston, kiu aperis en lia La Fenomeno Esperanto (temas nur pri originalaj verkoj):

Auld, William (red.): *Esperanta antologio*

Auld, W.; Dinwoodie, J. S.; Francis, J. I.; Rossetti, R.: *Kvaropo*

Auld, William: *La Infana Raso*

Baghy, Julio: *Pilgrimo*

Baghy, Julio: *Preter la Vivo*

Baghy, Julio: *Sur Sanga Tero*

Baghy, Julio: *Viktimoj*

Boulton, Marjorie: *Eroj*

Boulton, Marjorie: *Okuloj*

Bulthuis: *Idoj de Orfeo*

Engholm, Stellan: *Homoj Sur la Tero*

- Forge, Jean: *Mr. Tot Aĉetas Mil Okulojn*
Francis, John: *La Granda Kaldrono*
Francis, John: *Vitralo*
Hohlov, N.: *La Tajdo*
Kalocsay, Kalman: *Streĉa Kordo*
Kock, Edwin de: *Fajro Sur Mia Lango*
Konisi Gaku: *Vage Tra la Dimensioj*
Kurzens, Nikolai: *Mia Spektro*
Lorjak: *Regulus*
Luyken, Heinrich A.: *Pro Iŝtar*
Maŭra, G. E.: *Duonvoĉe*
Miĥalski, Euĝeno: *Prologo*
Miyamoto Masao: *Invit' al Japanesko*
Miyamoto Masao: *Naskitaj Sur la Ruino – Okinavo*
Nemere, Istvan: *Sur Kampo Granita*
Newell, L. N.: *Bakŝiŝ*
Piĉ, Karolo: *La Litomiŝla Tombejo*
Peneter, Peter: *Sekretaj Sonetoj*
Privat, Edmond: *Tra l' Silento*
Ragnarsson, Baldur: *Ŝtupoj Sen Nomo*
Ribillard, Jean: *Vivo kaj Opinioj de Majstro M' Saud*
Robinson, Kenelm: *Se Grenereto...*
Rosbach, Johan Hammond: *Fianĉo de l' Sorto*
Rossetti, Cezaro: *Kredu Min, Sinjorino!*
Rossetti, Reto: *El la Maniko*
Rossetti, Reto: *Pinta Kraĵono*
Rossetti, R.; Szilagyi, F. (red.): 33
Rakontoj: La Esperanta Novelarto
Sadler, Victor: *Memkritiko*
Schwartz, Raymond: *Kiel Akvo de l' Rivero*
Schwartz, Raymond: *La Stranga Butiko*
Schwartz, Raymond: *Verdkata Testamento*
Schwartz, Raymond: *Vole ... nevole*
Sturmer, K. R. C.: *Por Recenzo*
Szathmari, Sandor: *Vojaĝo al Kazohinio*
Szilagyi, Ferenc: *Koko Krias Jam*
Szilagyi, Ferenc: *La Granda Aventuro*
Tarkony, Lajos: *Soiĉfo*
Toth, Endre: *Lappar, la Antikristo*
Ueyama Masao: *Por Forviŝi la Memoron pri Ŝi*
Varankin, Vladimir: *Metropoliteno*
- Absolute necesaj:**
Auld, William: *Esperanta Antologio* (antologio de originalaj poemoj en Esperanto)
Auld, William: *Nova Esperanta Krestomatia* (antologio de poemoj, noveloj kaj eseoj, originalaj kaj tradukaj)
Kalocsay, Kalman: *Tutmonda Sonoro* (duvoluma antologio de poemoj tradukitaj en Esperanton el diversaj lingvoj kaj kulturoj)
Rossetti, Reto, k Vatre, Henri: *Trezoro* (duvoluma antologio de noveloj kaj romanelĉerpaĵoj originalaj)
- Ankaŭ diversaj tradukitaj verkaĵoj altkvalitaj estas ekzemple “Gösta Berling” de Selma Lagerlöf, “Sub la jugo” de Ivan Vazov, “Ses noveloj” de F. Tuglas.

Aimo Rantanen

Suomalainen Tolkien-harrastaja

Tänä syksynä ilmestyi J.R.R. Tolkienin kirjasarjan Taru Sormusten Herrasta kolmas eli viimeinen osa esperantoksi. Kirjasarja on nyt täydellisenä saatavana esperantoksi ja sen kunniaksi Esperantolehti julkaisee seuraavan jutun.

Anu Pölkki on nimeni, olen kohtapian 40-vuotias ja ammatiltani aseojija. Siinä tavallisuudet. Epätavallisuudeksi ympäristö tahtoo laskea sellaisen seikan, että pidän fantasiakirjallisuudesta ja erityisesti J.R.R. Tolkienin teoksista. Valtaosa niiden lukijoiksi tunnustautuvistahan on vähän yli tai alle kaksikymppisiä.

Tolkienistihistoriani

Muistan hyvin, kuinka tulin sukeltaneeksi Tolkienin tarumailmaan. Se oli vuonna 1983. Merkillistä sinänsä, etten törmännyt Tolkieniin jo aikaisemmin, olenhan ikäni lukenut melko paljon. Ehkäpä kirjat osuivat aina olemaan lainassa.

Olin katsellut Taru Sormusten Herrasta -kirjaa useita kertoja kirjastossa ja vaa-
ninut tilaisuutta lainata kaikki kolme nitettä samalla kertaa. Sain ne ja herkutelin ajatuksella saada ahmia tarinaa koko viikonlopun. Ja sitten sairastuin oikein vuosikymmenen flunssaan! Pah!

Krähisin viikon sängyn pohjalla ja min-
kä jaksoin, luin. Luin ja nukuin, nukuin ja luin. Kun taudinilkimys vihdoon hellitti, luin koko opuksen uudestaan ja heti perään englanniksi, eli alkukielellä. Nami! Sulateltuani hieman Tarua, n-
laisin kaikki muut Tolkienit, mitä käsiini

sain. Samalla tavalla kuin sanasta 'sala-
poliisi' tulee mieleen Conan Doyleen hah-
mo Sherlock Holmes, sanasta 'fantasia-
kirja' tulee mieleen Taru Sormusten Her-
rasta. Se on klassikko ja ansaitsee ase-
mansa.

Yhtymäkohtia esperantoon

Teitä esperantisteja varmaankin huvittaa tieto, että Tolkien oli kielitieteilijä ja teki fantasiamaailmaansa kokonaisen kielen ja sille oman kirjoitustavan. Kieli on nimeltään quenya ja kirjoitus tengwar, ja niitä molempia harrastetaan Tolkien-seuroissa, joita on suunnilleen jokaisessa Euroopan maassa, USA:ssa ja oletettavasti myös muualla.

Kielellisyys (mutta ei tieteellisyys) pursuavat J.R.R. Tolkienin kirjoista. Ne ovat erittäin juohevaa luettavaa, sopii verrata vaikka Mika Waltariin. Toivon, että Tarun on kääntänyt esperantoksi joku oikein taitava ihminen, koska niin suuri osa sen tenhosta on kielessä!*

Kun Suomen Tolkien-seura ry vuonna 1992 perustettiin, satuin kuulemaan siitä ja liityin oitis jäseneksi. Seurassa harrastetaan toki kirjojen tutkimista, niistä keskustelua ja muuta yhtä odotettavaa, mutta seuran toiminta on vahvasti myös hauskanpitoa ja Tolkienillekin saa nauraa.

Seuran kautta tutustuin larppaamiseen (Live Action Role Playing) eli näytelmäroolipelaamiseen, joka otti ja kolahti yhtä totaalisesti kuin Tolkieninkin. Lyhyesti sa-

* Kirjasarjan on esperantontanut William Auld (toim. huom.)



nottuna LARP on improvisaationäyttelemistä, jossa ei ole muuta yleisöä kuin toiset osallistujat ja näyttämö on yleensä varsin laaja, esimerkiksi pari neliökilometriä maastoa.

Suurin osa pelaajista tuntee Tolkienin maailman ja sieltä otetaan paljon vaikutteita fantasiagenren peleihin (muuta genrejä ovat esim. scifi ja kyberpunk). Myös LARP-harrastajien enemmistö on aika nuorta, mutta entäs sitten? Sekä pelaaminen, että pelien järjestäminen on hauskaa ja mielenkiintoista, joten ympäristö saa puolestani käyttää noita sopivuussääntöjään ja ennakkoluulojaan vessapaperina.

Jos siis, hyvät ihmiset, näette saman tapaisten puvun kuin kuvassa on päälläni, snobbaikaa huomauttamalla: ”Täällä on

Versoj por jarfino

Mia leteramikino Ligia Barragan sendis al mi kelkajn liniojn, kiujn mi tre ŝatas. Precipe la du lastaj linioj taŭgas kiel jarfina saluto al ĉiuj. La verkinto de la linioj ne estas konata, sed Ligia tradukis ilin el la hispana.

Saliko

Se vi havas donacon, ne kaŝu ĝin.

Se vi havas kanzonon, kantu ĝin.

Se vi havas talenton, montru ĝin.

Se vi havas laboron, ŝatu ĝin.

*Se vi havas problemojn,
alfrontu ilin.*

*Se vi havas feliĉecon,
dividu ĝin kun aliaj.*

*Ni ĉiuj havas ion,
kion oni povas doni.*

*Ni ĉiuj havas kanzonojn
por kanti.*

*Ni ĉiuj havas talenton
por disvolvi.*

Ni ĉiuj havas entuziasmon por disdoni.

*Ni ĉiuj havas amon
kaj ĝojon por doni.*

*Ni ĉiuj havas jaron
antaŭ ni por vivi.*

näköjään jossain fantasialarppi” sen sijaan, että yhtyisitte paheksunnansekaiseen ällistelyyn, jota rooliensa mukaan pukeutuneet pelaajat usein herättävät. Eihän sellainen konservatiivisuus sovi ihmiselle, joka harrastaa varsinaista vähemmistökieltä (ei puhuta äidinkielenä) ja ajaa sille asemaa kielenä muiden joukossa...

Anu eli jmm

La unua Finnlanda lingvofestivalo en urbo Jyväskylä

La unua Finnlanda festivalo fokusanta sin sur lingvoj okazis ĉe la laborista instituto de urbo Jyväskylä dum sep horoj la 25-an de oktobro. La inicianto kaj ĉefa organizanto estis prezidanto de la loka Esperanto-klubo Matti Lahtinen laŭ modelo de la lingvofestoj de Dennis Keefe.

La eniro estis senpaga kaj oni prezentis kaj instruis 33 malsamajn lingvojn en 50 lecionoj per la finna lingvo. La prezentantoj estis pleje enmigrintoj ellernintaj la finnan lingvon. Esperanton prezentis profesoro Jouko Lindstedt. Dum la komunaj paŭzoj estis i.a. distra prezento de romia modo. La festivalon subtenis mone la fremdlandaj asocioj de la urbo kaj la urba kulturoficejo. La asocioj kaj prezentantoj de la lingvoj starigis 19 standojn en la festivalejo. Oni sciigis pri la diversaj lingvoj, kulturoj, landoj kaj disdonis

etnajn frandaĵojn. Esperantoklubo de Jyväskylä informis pri Esperanto kaj servis sian verdan Esperanto-trinkaĵon kun kvinpintaj tranĉaĵoj el frukto karambalo. Post la festivalo la klubo aranĝis elementan Esperantokurson, kiun partoprenis kvin homoj.

La suma nombro de partoprenintoj de la lecionoj estis 335. Nemalmultaj homoj vizitis la standojn kaj rigardis la ekspozicion, kiu restis surloke dum du semajnoj. Pro malmulta reklamado kaj samtempa aŭtuna ferio de multaj edukejoj la okazaĵo estis relative malmulte vizitata, sed estis ŝatata.

La plej popularaj lingvoj laŭorde estis: la ĉina, Esperanto, franca kaj itala, hispana, hebrea, latina, slovaka, rusa kaj la surdula signolingvo.

Matti Lahtinen



La prezentanto de Esperanto, prof. Jouko Lindstedt.

Tarvitsetko oppivälineitä?

Suomen Esperantoliiton toimistossa ja Tampereen esperantoseuralla on nyt myytävänä luku- ja harjoituskirjoja nimeltä *Ludoviko Zamenhof, Esperanto-lernolibro kun ekzercoj por progresantoj*. Se sopinee niille, jotka ovat harrastaneet kieltä vuoden tai kaksi esim. viikottaisella tunnilla. Kirjan juoni perustuu Zamenhofin elämään ja työhön. Harjoitusten ratkaisut ovat kirjan lopussa. Hauskinta olisi käyttää kirjaa työparin tai ryhmän kanssa, koska lukuteksteistä voi myös keskustella. Kirjassa on sitä varten kysymykset. Sivuja piristävät aiheeseen liittyvät piirroksot. Kirja on saanut kiitosta mm. mikkeliiläisiltä.

Lars Forsman: Ludoviko Zamenhof, 57s., hinta 40 mk (+ postikulut 10 mk).



Prezento de romia modo.

Jo pari vuotta sitten Andrzej Pettyn laati suomalaisia aloittelijoita varten keskustelukurssin *Jutellaan*, jota yhä saa Mendoservolta (puh. 019-470055, osoite Kivistöntie, 05510 Hyvinkää). Kurssin voi aloittaa, vaikka ei vielä osaisi yhtään esperantoa, kunhan on työpari tai ryhmä, jotka käyttävät sitä yhdessä. Pettyn antaa hyvät mallit keskusteluille ja panee opiskelijat itse puhumaan. Puhussa voi syntyä helpottavaa hassuttelua ja naurun aiheita. Pieni persoonallinen muuntelu on mahdollista, ja annettu kaava suojaa virheiltä. Välillä on pysähdyttävä pänttämään sanoja tai kirjoittamaan omatekoisia vuoropuheluita. Ainakin alussa ryhmällä olisi hyvä olla joku pitemmälle ehtinyt ääntämismallina, varsinkin kun fonettiset selitykset eivät joka kohdassa ole painoteknisesti onnistuneet. Vaihtelua toisi myös laulaminen tai muu poikkeaminen kaavoista, joiden liiallinen käyttö voi alkaa tuntua tylsältä. Viihtyminen riippuu ryhmän/ ohjaajan kekseliäisyydestä. Ohjaajaksi on helppo uskaltaa ruveta, sillä kirjan malleissa pysyttäessä ei juuri voi tehdä kuin korkeintaan ääntämisvirheitä. *Jutellaan*-kirjassa on 15 oppituntia. Kahta enempää ei kannata kerralla mennä, vaikka viikonloppukursseilla on menty seitsemänkin peräkkäin. Keskustelujen lisäksi kirjassa on pieniä suomennostehtäviä.

Andrzej Pettyn: Jutellaan! Esperanton keskustelukurssi vasta-alkajille, 57 s. Hinta 29 mk (+ Mendoservon lähetyskulut).

Saliko

SEL atingis fakinsignon en Finnlando

Nun en en la asocio Geskoltoj de Finnlando eblas pro la strebado de Skolta Esperanto-Ligo akiri elekteblan fakinsignon per lernado de Esperanto. La insigno nomiĝas "La lingvisto" kaj ekzistas du niveloj, submajstra kaj majstra. La geskoltoj povas akiri ĝin lernante kiun ajn novan lingvon. La enkonduko de la fakinsigno estas rezulto de laboro de la Nacia Rezentantino de SEL en Finnlando Carola Antskog kaj la Redaktorino de La Skolta Mondo Anna Ritamäki. Ĝenerala lingva fakinsigno montriĝis pli taŭga ol pure esperanta.

Unuafoje eblis plenumi la kondiĉojn por ricevi la novan insignon dum la pli ol 10 000-persona tendarego LOISTO pasintsomere. Tie la Nacia Rezentantino Carola Antskog, kune kun grupo da junaj, por la okazo speciale preparitaj skoltestrinoj gvidis trihoran Esperanto-

vojeton por entute 200 geskoltoj. La geskoltoj grupete iris de stacio al stacio por ĉiuloke lerni iom pli da Esperanto kaj iom post iom plenigi provizitan kajeron. Fine ili intervjuis "eksterlandanon" (bedaŭrinde mankis vera eksterlanda esperantokolto en la tendarego) kaj post ripetado de la scioj ricevi subskribon pri plenumo de la postuloj por akrio de La lingvisto je submajstra nivelo. Nun de iom da tempo la ŝtofaj insignoj estas haveblaj kaj informoj aperis en la ĉefaj skoltaj gazetoj en Finnlando.

La tola insigno estas plurkolora kun terglobo en parolkadro (kiel tiuj en bildstrioj). Ĝia enkonduko ne vekis grandan interesiĝon pri la lernado de Esperanto, sed ĝi provizas bonan bazon por konatiĝo kun Esperanto en skoltaj kadroj. Evidente nun ĉefe dependas de la aktivado de SELanoj en Finnlando kiomgrade la geskoltoj interesiĝos akiri la fakinsignon per Esperanto.

Anna Margareta Ritamäki

Marjorie Boulton ricevas la FAME-premion

La prestiĝan Esperanto-Kulturpremion de Aalen en 1998 ricevos la renoma Esperanto-poeto d-ro Marjorie Boulton. Tion ĵus decidis FAME-fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj. Ŝi ricevos la sesan premion en valoro de 10 000 germanaj markoj (plej alta premiosumo en Esperantujo) pro siaj meritoj pri literaturo, scienca agado, edukado kaj kontribuoj al humaneco kaj interkompreno. La literatursciencisto Boulton, (nun

emerita) docento en fama Oksfordo, publikigis ne nur multajn poeziajn volumojn sed ankaŭ valorajn lernolibrojn kaj krome dum multaj jaroj gvidis la prestiĝan Esperanto-somerlernejon en Barlastono, kiun ŝi per granda engaĝiĝo kondukis al alta nivelo. Kiel sciencisto ŝi elstaris per multaj brilaj prelegoj kadre de la Internacia Universitato dum Universalaj Kongresoj kaj dum vojaĝoj tra multaj landoj; ĉiam ŝi sukcesas fascini sian aŭskultantaron kaj per polurita stilo kaj per eksterordinara enhavo.

Ilustrita vortaro pri heraldiko

Doneck, 1996, 345 paĝoj, enkonduka kaj reklampartoj ruslingvaj. 1005 terminoj en sep lingvoj: rusa, ukraina, angla, Esperanta, franca, germana, latina. Kun indeksoj por ses lingvoj. La kovrilo kolora firma kun plasta kovraĵo. Formato 20 x 13 cm. La prezo 30 USD kun poŝtelspezoj.

Pagmaniero: persona konto "nist-c" ĉe UEA. La mendojn bv. sendi al:

Nikolaj Starodubcev, "Amika Rondo", a/k 191, 340 000 Doneck, Ukrainio.

Informo en la TTT-ejo: <www.library.donetsk.ua>.

Amikeca Reto en Interreto

La Amikeca Reto (servo de SAT) nun posedas rektan ret-adreson, kien vi povas sendi (re)-aliĝilojn aŭ informpetojn.

<a.reto@france-association.com>

Amikeca Reto; 88 st. Viktor Hugo; FR-37400-Amboise.

Universitata lingvo- ekzameno en Esperanto

Lingvo-centro de Universitato de Jyväskylä aranĝos la 16-an de januaro 1998 ekzamenon pri skriba kompreno de Esperanto. La nivelo de la ekzameno egalas al la nivelo de ĝeneralaj lingvoekzamenoj en finnlandaj universitatoj. Kutime tia nivelo postulas trijaran lernadon de la lingvo kaj krome universitetnivelan unujaran kurson pri skriba kompreno. La lingvocentro pretas aranĝi ekzamenojn en Esperanto ankaŭ estontece laŭbezzone. Pro malgranda kvanto da esperantistoj la kompilinto de la ekzameno volas resti anonima.

Oikaisu - ĝustigo

Marraskuun numerossa 5/97 olleet valokuvat syyspäiviltä oli ottanut Veli Hämäläinen.

La bildoj de la Aŭtunaj tagoj en la novembra numero 5/97 estis fotitaj de Veli Hämäläinen.

FAME-prezidanto kaj fondinto de "Monato", Stefan Maul, aldonas: "Ni krome agnoskas per la premio ŝian ĵurnalistan agadon, precipe en MONATO, kie ŝi aperigis abunde interesajn artikolojn pri ofte nekutimaj temoj; ŝi scias verki pri ŝajnaj bagateloj de la homa vivo pensigajn kaj amuzajn kontribuadojn. Marjorie Boulton neniam tedas!"

Tamen, kiel emfazas Maul, oni honoras per la kultur-premio precipe ŝian poezion: "La tutan verkaron de Marjorie Boulton distingas profunda humaneco,

kiu tute konforme al la FAME-statuto spiras toleremon kaj interkomprenon."

La solena matineo en la urba biblioteko de Aalen, kie troviĝas ankaŭ la biblioteko de Germana Esperanto-Instituto, okazos probable dum printempo 1998; preciza dato ne jam estas fiksita. Marjorie Boulton estas la tria virino, kiu ricevas la kultur-premion, post Ada Fighiera-Sikorska kaj Spomenka Ŝtimec. Premiito estis, cetere, ankaŭ la ĵus mortinta poeto Rikardo Ŝulco.

Stefan Maul

Belartaj Konkursoj de UEA en 1998

La Belartaj Konkursoj de UEA denove invitas partoprenantojn por siaj sep branĉoj. La rezultojn oni anoncos en la Universala Kongreso en Montpeliero. (Tamen, partopreno en la UK ne estas kondiĉo por partopreni en la Konkurso!) La laŭreatojn atendas monpremioj, kiuj estas pli altaj ol antaŭe.

Ĉiuj konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la UK: "Mediteraneo – ponto inter kulturoj". Premio "Luigi Minnaja" kaj du aliaj premioj.

Kanto: Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio "Ahn-Songsan" kaj du aliaj premioj.

Vidbendo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo (vd. Eseo). Daŭro inter 15 kaj 60 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1997. Unu premio.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej

laste la 31-an de marto 1998. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 1998.

Ĉion oni sendu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnneweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkuras.

Premioj: Unua premio: 410 gld. Dua premio: 287 gld. Tria premio: 164 gld. Nova Talento (por la plej bona konkursanto antaŭe ne premiita) 287 gld. Infanlibro de la Jaro: 861 gld.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

Detala regularo haveblas kontraŭ unu respondkuponon ĉe UEA, Nieuwe Binnneweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, aŭ retpoŝte <uea@inter.nl.net>.

Interrete en Esperanto el Normandio

La Esperanto-versio de TTT-ejo de Priturisma regiona komitato de Normandio aperis la 1an de oktobro kun 9 ĉefaj temoj (klimato, historio, artoj, industrio, agrikulturo ktp). Tiu esperantlingva estas nun en plurmonata provperiodo. La esperantaj paĝoj restos en Interreto se estos sufiĉe da alvokoj. La retadreso estas: <www.normandy-tourism.org>.

El la Plena kalendaro de Esperanto-aranĝoj

26-31. decembro 5-a Togolanda E-Kongreso, Atakpame. Inf: Unuiĝo Togolanda por Esperanto, B.P.12096, Lomé Togolando

27. decembro – 03. januaro 14-a Internacia Festivalo, por mezaĝuloj kaj junaj familioj, Trier. Inf: Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. Tel: +49-5624-8007, fakso: +49-5624-322

27. decembro – 03. januaro 41-a Internacia Seminario (IS) Traben-Trabach. Inf: Germana Esperanto-Junularo, Chausseestr. 8, DE-10115 Berlin, Germanio. Tel/fakso: +49-30-2834320. Rete: neffets@cs.tu-berlin.de

27. decembro – 03. januaro Jarfina ferio ĉe La Domparo, La Chaŭ-de-Fonds. Inf: Kultura Centro Esperantista, Poŝtfako 311., CH-2301 La Chaŭ-de-Fonds, Svisio. Tel/fakso: +41-32-926407

29. decembro – 02. januaro Budapeŝta Silvestro. Inf: Espertur, HU-1368 Budapest, pf. 193., Hungario. Fakso: +36-1-2680331. Rete: esperantohea@mail.c3.hu

30. decembro – 02. januaro Silvestra Balo – Vintraj Ekskursoj, Poprad. Inf: Esperanto –

Regiona Societo, Sobostske nam. 36, SK-05801 Poprad, Slovakio. Tel: +421-92-32419

30. decembro – 03. januaro Silvestra Balo, kulturaj aranĝoj kaj ekskursoj, Parizo. Inf: Raymond Pérault, Centre Culturel Espéranto de Paris, 4bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris, Francio. Tel: +33-1-42786886, fakso: +33-1-4278847<P>

31. decembro Silvestra Balo en Budapeŝto. Inf: Movilo, Sorokséri ét 117, HU-1095 Budapest, Hungario. Tel: +36-1-1782793

Dum la tuta jaro:

Vizitoj en la domo de Zamenhof. Inf: Litova E-Asocio, str. Zamenhofo 5, LT-3000 Kaunas, Litovio. Tel: +370-7-208503

Vizito al Nacia Esperanto-Muzeo, Gray, dum tuta jaro merkrede kaj sabate de la 15a ĝis la 18a horoj. Adreso: 19, rue Victor Hugo, FR-70100 Gray, Francio. Tel: +33-0384651173

Esperantistaj vizitoj en Istanbul. Inf: Enver Yalçın, P.k. 1328, TR-34438 Sirkeci-Istanbul, Turkio. Tel: +90-212-5884286

Internacia Esperanto-Studejo. Inf: Monda Turismo, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando. Rete: turismo@bydg.pdi.net Tel:+48-52-415744

Paska renkontiĝo en Nederlando

Tempo: 10-13 aprilo 1998.

Loko: apud Joure, norda Nederlando.

Temo: **Konsumeti** – malpli multe kaj pli konscie konsumi.

En ĉi tiu tempo kun medipoluo tre gravas ke ni konscie traktas nian vivmedion kaj ĝiajn produktojn. Tial ni devas mal-kreskigi la rubomonton. Kiel ni mem

povas helpi, tion vi povas ekscii dum la Paska Renkontiĝo 1998.

Krome, Kajto koncertos. Ni festos kun ili ilian dekjariĝon. La koncerton oni surdiskigos. La publiko kunkantos. Do se vi volas ke via voĉo estos sur la kompaktdiskon...

Se vi volas pliajn informojn aŭ paperan aliĝilon: skribu al <nej@dds.nl>.

Poŝta adreso: Nederlanda Esperanto-Junularo, Molenstraat 46 C, NL-5701 KG Helmond, Nederlando.

Eŭropa Kalendaro por la jaroj 1999-2000

Ĉiutage oni prezentas sur paĝoj de la Eŭropa Kalendaro unu vorton (kun bildo) en Esperanto, en la Latina kaj en 13 lingvoj de la Eŭropa Unio. Sur la dorsaj paĝoj de la kalendaro troviĝas informoj pri historio, unuopaj landoj kaj atendolandoj de la Eŭropa Unio, pri Eŭropa Klubo kaj lingvopolitiko. La Eŭropa Klubo planas eldoni la Eŭropan Kalendaron en julio 1998. Multaj antaŭmendoj reduktos la prezkostojn. Antaŭvidita prezo estos 12 DEM plus sendokostoj, rabato ekde 5 ekzempleroj. Subskriba prezo 10 DEM ĝis julio 1998. La UEA-konto estas *eklu-l*.

Kontaktoj al EuropaKlub/IfK Verlag, Dr. Barandovská, Kleineberger Weg 16a, D-33100 Paderborn, Deutschland.

Tranoktu en Esperanto-oficejo

Eblas tranokti en nova Esperanto-oficejo en Helsinki. La oficejo situas oportune proksime al la urbocentro kaj vivnivelo en ĝi estas pli alta ol en la malnova oficejo. La tranoktado kostas 100 mk/nokto sendepende de kvanto da personoj. Kontakti la oficejon marde vespere, tel. (09) 715538.

Korespondi deziras

Mi estas 41-jara estono, fraŭlo, komencanto. Miaj ŝatokupoj: vojaĝado, literaturo, historio kaj numismatiko. Mi havas tre malgrandan kolekton da bildkartoj kaj moneroj. Se vi volas, ni povos interŝanĝi ilin. Skribu al: Kalju Junis, Lääne maakond, Ridala sjk, Parila, EE-3181, Eesti.

Talvipäivät ♦ Vintraj Tagoj

Kuopio 21.-22.2.1998

Kokouspaikka: Hotelli-kylpylä Rauhalhti, 5 km etelään kaupungin keskustasta
Kunvenejo: Hotelo-banejo Rauhalhti, 5 km sude de la urbocentro.

Alustava ohjelma Provizora programo

Lauantai • Sabato 21.2

12.00- Ilmoittautuminen alkaa.

Akceptejoj malfermas.

12.56 Juna etelästä saapuu Kuopioon.

Trajno el la sudaj partoj de Finnlando alvenas. Bussikuljetus hotellille.

Transporto per aŭtobuso al la hotelo.

13-14.30 Lounas. Lunĉo.

14.30 Talvipäivien avaus. Malfermo de la Vintraj Tagoj. Matti Pesonen ja pojat: Sibeliuksen musiikki; musiikkia, kerrontaa, kuvia. Matti Pesonen kaj la gefiloj: Muziko de Sibelius; muziko, rakonto kaj bildoj.

16.00 Kuvia ja tietoa Montpellieristä.

Bildoj kaj scioj pri Montpellier.

16.45 Iltapäiväkahvi. Posttagmeza kafo.

17.00- Uintia, saunomista ja vesileikkejä kylpyläosastolla. Naĝado, saŭnado kaj akvoludoj en la banejo.

17.15- Kokouksia. Kunvenoj: KELF, ELFI.

20.00 Hallituksen kokous. Kunveno de la estraro de EAF.

20.30-22.00 Yhteistä iltaohjelmaa.

Komuna vespera programo. Tanssira-vintola Yölintu avoinna 01 saakka ja Yökerho 1001 yötä klo 04:ään, vapaa

sisäänpääsy. Dancrestoracio malfermas ĝis la 01 kaj noktoklubo ĝis la 04.

Sunnuntai • Dimanço 22.2

9.00 Aamuhartaus. Matena preĝo.

9.15 Vuosikokousvaltakirjojen tarkastus. Kontrolo de rajtigiloj.

9.30 Suomen Esperantoliiton vuosikokous. Jarkunveno de EAF. Kokouksen jälkeen Suomen Esperantoliiton hallitus vastaa toimintaa koskeviin kysymyksiin. Post la kunveno la estraro de EAF respondas al demandoj koncerne la agadon.

12.30- Lounas. Lunço.

13.30 Talvipäivien päätös. Fino de la Vintraj Tagoj.

14.00 Bussikuljetus rautatieasemalle. Aŭtobusa transporto al la stacidomo.

14.29 Juna etelään lähtee. Trajno suden ekiras.

Majoitusvaihtoehdot Alternativoj por tranoktado en Rauhalhti

Hotellissa 1-2 hengen huoneissa. En hotelo en 1 kaj 2-litaj ĉambroj.

Hostelli, 150 m hotellilta, huoneistoja, joissa kussakin 2 kpl 2 hengen makuuhuonetta, keittiö, wc/suihku, puhelin ja TV. Hostelo, 150 m de la hotelo; apartamentoj kun du 2-litaj ĉambroj kaj kuirejo, necesejo/duŝo, telefono kaj televidilo.

Lähetä ilmoittautumislomake osoitteella Päivi Saarinen, Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo ja maksa osallistumismaksu ja muut varauksesi hyvissä ajoin ennen talvipäiviä EAF:n tilille 800017-230825.

Ilmoittautumislomake

Nimi: _____

Osoite: _____

Puhelin: _____

Osallistumismaksu:

ennen 31.12.1997 60 mk _____

ennen 31.1.1998 90 mk _____

myöhemmin 120 mk _____

FEJOn ja Steleton jäsenet maksavat puolet osallistumismaksusta.

Kokouspaketti sisältää: majoituksen, su aamiaisen, la ja su lounaan ja la iltapäiväkahvin sekä vapaan sisäänpääsyn kylpyläosastolle ja iltaravintoloihin.

Kokouspaketti/henkilö:

– hotellissa 2 hh 410 mk _____

1 hh 550 mk _____

– hostellissa 2hh 345 mk _____

1 hh 465 mk _____

Erikseen varattaessa:

Majoittuminen

– hotellissa 2 hh 240 mk _____

1 hh 380 mk _____

– hostellissa 2 hh 175 mk _____

1 hh 295 mk _____

Hinnat sisältävät aamiaisen ja kylpylän käytön.

Lauantai lounas 75 mk _____

Sunnuntai lounas 75 mk _____

Lauantai kahvi 24 mk _____

Illallinen 100 mk _____

Edestakainen bussikuljetus Kuopion rautatieasema-Rauhalhti. 30 mk _____

Haluan kasvisruokailun.

Lisätoiveita: _____

Allekirjoitus _____

Aliĝilo

Nomo: _____

Adreso: _____

Telefono: _____

Aliĝkotizo:

ĝis 31.12.1997 60 mk _____

ĝis 31.1.1998 90 mk _____

poste 120 mk _____

Membroj de FEJO kaj Steleto pagos duonon el la aliĝkotizo.

Kongresa paketo enhavas: tranokton, matenmanĝon (dim), 2 lunĉojn (sab & dim) kaj posttagmezan kafon (sab) kaj senpagajn enirojn en la banejon kaj vespere en la restoracion kaj noktoklubon.

Kongresa paketo/persono:

– en hotelo 2-lita ĉ. 410 mk _____

1-lita ĉ. 550 mk _____

– en hostelo 2-lita ĉ. 345 mk _____

1-lita ĉ. 465 mk _____

Aparte mendeblaj:

Tranokto

– en hotelo 2-lita ĉ. 240 mk _____

1-lita ĉ. 380 mk _____

– en hostelo 2-lita ĉ. 175 mk _____

1-lita ĉ. 295 mk _____

Prezroj enhavas matenmanĝon kaj banejon.

Sabata lunĉo 75 mk _____

Dimanĉa lunĉo 75 mk _____

Sabata kafo 24 mk _____

Vespermanĝo 100 mk _____

Autobŭsa transporto stacidomo-Rauhalahtien kaj reen. 30 mk _____

Mi deziras manĝi vegetare.

Kromaj deziroj:

Subskribo _____

Estraro kunvenis

La estraro de EAF kunvenis la 15-an de novembro 1997 en oficejo de Esperantoklubo Antaŭen en Tampere. La kunveno daŭris kvin horojn. Ĉeestis ĉiuj estraranoj kaj vic-estraranoj krom Matti Lahtinen, Raita Pyhälä kaj Tuula Virolainen.

La estraro gratulas Liisi Oterma, kiu fariĝis honora membro de UEA en Universala Kongreso en Adelajdo. La estraro konstatis, ke UEA uzis la respondon de EAF kiel modelo de respondo de landa asocio al demandoj pri la kampanjo 2000.

La estraro konstatis, ke la sperto de librofoiro en Turku 3.-5.10.1997 estis pozitiva: venis demandoj pri kursoeblecoj kaj ankaŭ vendoj sukcesis ne malbone. Okazis ankaŭ lingvofoiro en Jyväskylä 25.10.1997.

La estraro informiĝis, ke semajnfina kurso en Helsinki 8.-9.11. havis 5 partoprenantojn kaj la semajnfina kurso en Turku 4 partoprenantojn. Komencis elementa kurso ankaŭ en Oulu.

La estraro decidis aĉeti de ELFI 20 ekzempleroj de lerno- kaj ekzercokajero "Zamenhof" kaj plu vendi ĝin per 40 mk + sendokostoj 10 mk. La estraro diskutis la proponon de Esperantoklubo de Helsinki pri prizorgado de la oficejo kaj decidis proponi al EKH kelkajn ŝanĝojn. La estraro decidis, ke la librotenada materialo de la konto Linja estos sendita al revizoroj nun kiam la konto estas nuligita.

La estraro diskutis pri la respondo de la administracio de registroj al statutŝanĝo. La administracio proponas korektojn al la novigita statuto de la asocio.

La estraro diskutis pri la programo de Vintraj Tagoj en Kuopio 21.-22.2.1998 kaj akceptis la proponon de Seija Kettunen. La estraro proponas prelegon pri Sibeliuss, programeron "la estraro respondas" kaj informojn

pri Montpeliero por la sabato. La aliĝkotoj estos 60 mk ĝis la jarfino, 90 mk ĝis 1.2.1998 kaj 120 mk poste.

La estraro diskutis detale pri la venontjara agadplano. Sylvia Hämäläinen prezentis informojn kolektitajn en enketo inter membroj de ELFI pri instruado.

La estraro proponas, ke la unua trejnada kurso por instruistoj estos aranĝata sekvan someron semajnfine antaŭ aŭ post la kurso en Jyväskylä. La estraro konstatis, ke EAF povas subteni tiajn kursojn de lokaj grupoj pagante la kostojn de instruistoj laŭ peto.

Listo pri la libroj prunteblaj el la oficejo estos sendita al kluboj, individuoj ricevos ĝin laŭ peto. La lernolibro Jen nia mondo estos vendata al kluboj per poa prezo de 40 mk, la vortaro per 30 mk.

La estraro konstatis, ke en agadplano povus jam esti mencio pri la aranĝoj kiujn EAF celas partopreni dum la jaro, ekz. Librofoiro, punkto de artoj, lingvofoiro. La prezidanto diskutos denove pri prelegserio en la universitato de Helsinko. Ankaŭ pripensinda estus proponi al la prezidanto de UEA viziton en kelkaj finlandaj universitatoj.

Dum la venonta jaro la estraro klopodos ankoraŭ plibonigi intersangon de informoj kun membrokluboj. En decembro la sekretario sendos al la membrokluboj leteron kun informoj pri la funkciado de la oficejo ktp. kaj kun enketilo por la agadraporto. La estraro volas ankaŭ pliefektivi informadon pri finlandaj aferoj al internacia esperanta gazetaro per ekz. Interredaktore de Eventoj.

La estraro diskutis pri la preparo de nova vortaro surbaze de memorandon de Jouko Lindstedt. La estraro konstatis neceson havigi al la oficejo faksilon kaj kopimasinon.

Jukka Laaksonen estis nomumita nova kontaktopersono de EEU-kampanjo kaj li

studos la aferon. La kunlaboro kun Zimbabvo bezonus pliefektiviĝon. Venontan jaron EAF sendos al Zimbabvo sian organon Esperantolehti kaj eble aranĝos monkollektadon en iu el siaj aranĝoj.

La kunsido diskutis la ĝeneralan financon situon de EAF laŭ la informoj donitaj de la kasisto por la kunsido. La oficejaj kostoj estas sufiĉe grandaj plejparte pro posedo de du oficejoj momente. La estraro decidis plej eble baldaŭ komenci vendadon de la loĝejo ĉe Pengerkatu. La kunsido diskutis ankaŭ pri librotenado kaj ĝiaj kostoj.

La sekva kunsido okazos la 17-an de januaro 1998 je 11.00 en la oficejo.

Vuosikokouskutsu

Esperanto-Asocio de Finnlando, Suomen Esperantoliitto ry:n sääntömääräinen vuosikokous järjestetään sunnuntaina 22.2.1998 Kuopiossa hotelli Rauhanlahdessa klo 10.00 alkaen.

Käsiteltävinä ovat sääntömääräiset asiat.

Tampereella 15.11.1997

Suomen Esperantoliiton hallitus

Alvoko al la jarkunveno

Laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando, Suomen Esperantoliitto r.s. okazos dimanĉe la 22-an de februaro 1998 en Kuopio en hotelo Rauhanlahti, ekde la 10-a horo.

Traktotaj estas la laŭstatutaj aferoj.

En Tampere la 15-an de novembro 1997

La estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando

Päiväkirja sinisestä seikkailusta

(...jatkoa viime numerosta)

Torstai 3.7.

Aamu-uinnin ja aamiaisen jälkeen lähdimme kävellen tutustumaan Jyväskylän jätevedenpuhdistamolle. Miten ihailinkaan norjalaista Oddia, joka kyynärkeppeineen viikinkimäiseen tapaan oli mukana kaikissa tapahtumissa. Aluksi toimitusjohtaja Kirsi Laamanen esitti suuren kuvan avulla jätevedenpuhdistamon toimintaa ja Terttu Tyynelä käänsi kaiken sujuvasti esperantoksi. Tämän jälkeen lähdimme tutustumaan eri vaiheisiin. Ensimmäisessä, mekaanisessa puhdistusvaiheessa erotetaan karkeat epäpuhtaudet. Pidän nenästäni kiinni ja menin urheasti sisään huoneeseen, johon jätettä oli kerätty – ja äkkiä ulos!! Toisessa, biologisessa puhdistusvaiheessa suurissa altaissa mikro-organismit tekivät työtä vuorotta ja söivät liukoiset fosfori- ja typpiyhdisteet. Kolmas vaihe oli jälkiselkeytys, jossa suurissa pyöreissä altaissa liete painuu pohjaan ja puhdas vesi palautuu Päijänteeseen. Seuraavissa vaiheissa jäljelle jäänyt liete sakeutetaan, mädätetään ja kuivataan. Kuivattu liete

käytetään sitten hyväksi kaupungin puistoissa kasvilannoitteena. Puhdistamo tulee lähivuosina olemaan lähes 100%:sti omavarainen energian suhteen, kun lietteen mädätysvaiheessa syntävä metaanikaasu käytetään hyväksi. Paluumatkalla ajattelin ylpeydellä suomalaista osaamista; tällaista puhdistusteknologiaa tarvittaisiin joka puolella maailmaa. Jätevuoret siis energiaksi!

Herkullinen ja maittävä lounas hävitti viimeiset muistot puhdistamon hajuista. Sitten kävimme Marjatan kanssa Viherlandiassa (ennätyslämpötila 34°C!!). Hilarius Hiiren kotitalo oli juuri avattu Viherlaaksossa, joka on mainio vierailukohde sekä lapsille että kasveja rakastaville aikuisille. Jokapäiväinen esperanto-opiskelu jatkui iltapäiväkahvin jälkeen. Raita esitti kaavion, jolla kysymyksiä voi painaa mieleensä paremmin. Tämän kaavion kyllä kirjoitan puhtaaksi kotona ja pistän seinälle. Voisinpa upottaa mieleeni pysyvästi myös ne taulukkosanat!! Harjoittelimme lisäksi pienen hupaisan esityksen iltaa varten. Sirkka oli hotellinpitäjän roolissa, Tiina matkailija ja minä ravintolavieras.

Esperantoklubo de Lahti

La estraro por la jaro 1998:

Esa Lång, prezidanto, Lokinkatu 5, 15610 Lahti, tel. (03) 7352 723.

Martti Pennanen, sekretario, Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti, tel. (03) 7333 288.

Soili Salminen, kasisto, Kivikatu 8 C, 15700 Lahti, tel. (03) 7817 637.

Estraranoj:

Matti Soikkeli, vicprezidanto, Hettakatu 10, 15840 Lahti, tel (03) 7532 753.

Hilkka Galle, Metsäpellontie 39 F 50, 15200 Lahti, tel. (03) 7334 639.

Börje Eriksson, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä, tel. (03) 7851 191.

Adreso de la klubo estas la sama kiel tiu de Martti Pennanen.

Novajoj el Kuopio

Ni Kuopio-anoj kaj Vesanto-anoj komencis interesiĝi novmaniere pri Esperanto. Ni kunvenas laŭvice en Kuopio kaj Vesanto. Ni decidis komence organizi nian agadon neoficiale. La nomo de nia neoficiala klubo estas "Savo". La prezidanto estas Kimmo Hakala (tel. 017-648831, 72330 Tiitilänkylä) kaj la sekretario estas Marja Soininen (tel. 017-650511/hejmo kaj 017-650551 telefono/fakso/laboro). Ni havas kunvenojn/diskut-rondon ĉiumonate.

Bonvenon al la vintraj tagoj en Rauhalahdi! Ankaŭ ni Savo-anoj agos laŭpove pro ĉi tiu evento!

Matti Pesonen

Hupailun aiheena oli tietysti kielitaito – vaikka osaisi kymmeniä kieliä, ne eivät ehkä aina riitä!

Illalla klo 18.00 alkoi Seikkailijoiden sininen hetki. Istuimme opiston takkahuoneessa nauttien sinistä boolia ja kalakukkoa sekä omista ohjelmistamme. Odd Tangerud on mainio esperantonkielinen runoilija ja näyttelijä. Myös Anja Karhiainen, joka on aloittanut vasta pari vuotta sitten, tekee riimityksiä esperantoksi aivan loistavalla tavalla. Nora Caragea luki esperantoksi kääntämäänsä saksalaista lastenkirjaa ja Aurelio kertoi argentiinalaisia veteen liittyviä tarinoita. Illan vieraaksi tullut Tiina Oittinen Turusta soitti viululla ja myös säesti yhteislauluamme. Meidänkin esityksemme sujui ihan mukavasti, Sirkka oli tosi yrmeä hotellinpitäjä! Sitten julkistettiin kaarnalaivakilpailun tulos, jossa hämmästykseni eniten ääniä sai minun laivani. Palkintokirja *Muminvalo* muistuttaa minua aina tästä tapahtumasta. Lopuksi vielä saunoimme ja uimme. Sitten helteen kehittämä ukonilma purkautui juuri sopivasti saunaillan päätteeksi ja luonto sai kaipaamaansa vettä.

Perjantai 4.7.

Sinisen seikkailun viimeisenä aamuna helle ei tuntunut enää yhtä voimakkaana kuin aikaisemmin. Aamiaisen jälkeen kertasimme jälleen kuvien avulla kaikkea oppimaamme: ääntämistä, kysymyksiä, vastauksia, verbejä, adjektiiveja, esineitä, perheenjäseniä, eläimiä, maita, kukkia,

värejä, lukusanoja, aikaa, prepositioita ym. Raita kertoi myös kirjeenvaihtotoverin hankinnasta, vuotuisista Esperanto-kongresseista ja kansainvälisestä toiminnasta. Saimme oppaan ”Eteenpäin Esperantossa”, sillä muutaman päivän intensiivisen opiskelun jälkeen on tiedostettava miten tästä jatketaan. Minä olen jo päättänyt hankkia kirjeenvaihtotoverin. Haluan sellaisen kielitaidon, että voin osallistua v. 98 kongressiin Ranskan Montpellierissä.

Lounaan jälkeen vetäydyin huoneeseen miettimään esperantonkielistä tekstiä, jonka aion sanoa antaessani Raidalle jäähyväiskukat. Näin tulee olemaan lähitulevaisuudessa: omat ajatukset täytyy sanakirjan avulla saada paperille! Iltapäivän kahvitilaisuudessa saimme kurssitodistukset, halusimme ja jätimme toisillemme jäähyväiset. Meidän alkeiskurssilaisten ainakin tulee vaihtaa kuulumisia silloin tällöin! Opiskeluaineisto ja kaarnalaivat autoon pakattuna jätimme opintokeskuksen. Ostoskeskuksen lämpömittarissa oli ainoastaan 25°C ja pilviä taivaalla siellä täällä.

Ajaessani kotiinpäin muistelin Salikolle annetun jäähyväisviestin sanoja: *Nun ni iras sur la Esperanto-vojo plifacila*. Kuljemme Esperanto-tiellä nyt helpommin! Tästä on hyvä jatkaa. Olen todella iloinen, että sain osallistua monipuoliseen ja vaihtelevaan Siniseen seikkailuun Jyväskylässä.

Kati Lindell

Muut lehdet ja televisio

Savon Sanomissa oli 17.10. Lyhyesti-palstalla juttu Iisalmessa vuonna 1999 pidettävän esperantonkielisen Tonttujen maailmankongressin valmisteluista. Iisalmen kaupungin kulttuurikeskuksen johtaja Reino Eriksson ja kulttuurisihteeri Tuula Laatikainen ovat saaneet valmiiksi haltijakertomuksia sisältävän satukirjan käsikirjoituksen. Kaupunkiin jää maailmankongressin myötä pysyvä kansainvälinen kansanperinnenäyttely.

Tiistaina 4.11. haastateltiin TV 1:n Tiistaitiima-ohjelmassa Hilja Virtasta viikon tervaskantona. Tampereen Amurin kaupunginosassa asuva Hilja Virtanen harrastaa myös esperantoa monien muiden harrastustensa ohella. Haastateltava kertoi ohjelmassa hyvin monivaiheisesta elämästään työläiskaupunginosan kasvattina. Tervaskanto-osuus alkoi ja loppui esperantonkieliseen tervehdykseen.

Du alumetojn – diris Setälä

La vintron, militvintron, Arvikolo pasigis en malgranda industria vilaĝo, ne malproksime al la loko kie en antaŭaj someroj la tendaroj okazis. Stranga estis la sento dum la vintro. Neniam pli frue oni vidis tiom da aviadiloj – estis eksterordinare malvarme, kaj la tagoj estis sune brilaj. Kaj preskaŭ ĉiutage flugis bombaeroplanoj grandsvarme, en tre granda alteco, kun celoj en la okcidentaj regionoj de la lando. Estis ĉiam maŝinoj de la kontraŭulo, propran aviadiston oni tie neniam vidis. La aerarmeo de nia lando estis tiam kompatinde malsufiĉa. La vilaĝon, kie la familio de Arvikolo pasigis la vintron, la militaj eventoj preterpasis. Nur unufoje la vizitantoj de trans la orienta landlimo ĵetis unu bombon, maltrafe celitan, kiu nenion difektis. Sed la noktoj estis brile gloraj. Nature, ĉar en la tuta lando regis deviga mallumigo, ne eĉ fajrero estis videbla. Sekve oni havis bonegan okazon observi stelojn, kiuj videblis multnombre. Aro de knaboj interesiĝis pri astronomiaj fenomenoj, oni bone konis diversajn konstelaciojn. Oni multe legis pri steloj kaj planedoj. La fama populara prezento de astronomio de Camille Flammarion eluziĝis en la manoj. La bildoj pri supozita aspekto de Venuso aŭ Marso nutris la fantaziojn, en multaj tekstoj oni tute serioze sugestis, ke ekzistus artefarita reto de kanaloj sur la ruĝa planedo. Certe iu marsana lerneja knabo observis la Teron tra binoklo, same kiel

ni la Marson. Por ĉiuj tiaj aferoj, same kiel por longaj skiekskursoj en la neĝkovritaj arbaroj abundis tempo, ĉar lernejoj estis fermitaj.

La milito finiĝis en marto, kun tristeco oni observis ke krom pluparton de la provinco Karelio ni perdis ankaŭ kaj Petsamo-areon kaj insulon Tytärsaari, inter aliaj insuloj de Golfo de Finnlando. En la hejma urbo abundis memoraĵoj de pasinta milito. Tute proksime al hejmo, tuj post la bestomuzeo, unu granda loĝdomo aspektis kiel vizaĝo de variolo-paciento, la bombfragmentoj forhakis pecetojn el la stuko, tiel ke la ruĝo de brikoj montriĝis. Ĉiuj fenestroj tute rompiĝis. La hejmo de bona amiko Nefo tiel staris la tutan vintron, kun mankantaj vitroj kaj frakasita pordo, sed ne eĉ unu objekto estis ŝtelita.

En la komenco de majo patro, barbovizaĝa kaj laca, revenis hejmen. Lia vojaĝo "ie tie" daŭris sep monatojn. La konduto de Lukki, la flavpeltulo, amuzis ĉiun. Li ne rekonis la strange aspektantan barbulon kun malpura neĝmantelo. Nur kun grandaj okuloj rigardis.

Arvikolo iom preparis sin por allaso en liceon kaj – *mirabile dictu* – sukcesis eniri tien. Patrino donacis libron, tiam multe amatan de lernejoj, nomatan Giganteto. Kaj tie ree ekaperis tiu pensojn tiklanta afero, la lingvo nomata Esperanto. Eĉ hodiaŭ Arvikolo memoras kelkajn frazojn: "... Mi vidis grandan

hundon en la ĝardeno... Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn..."



Foje, en la komenco de la 50-aj jaroj, Vilho Setälä kaj Arvikolo spekulaciis pri la ebleco de inteligenta vivo ie en la universo. Unuanime oni komprenis, ke en nia sunsistemo la ebleco estas nula. Sed aliloke, certe. Pri tio ni havis komunan opinion. Pri la ebleco, ke la homoj iam renkontus spacovojaĝantojn el iu alia sunsistemo aŭ galaksio, Setälä, la fizikisto, estis ekstreme dubema. La probablecon li prezentis per parolfiguro: Unue, prenu glason da akvo, kaj ĵetu du alumetojn en ĝin. Kirflu la akvon, kaj eventuale la du alumetoj sin metos flank-al-flanko, tiel tenataj per la surfaca tensio. Estas simile al du civilizitaj popoloj sur nia planedo. Pli malpli frue ili kontaktos, kreiĝas internacia rilato. Sed ĵetu unu el la du alumetoj en la maron ĉi tie, en Helsinko, kaj la duan en la lagon en Ĉikago. Ekzistas ebleco, ke ili renkontos, sed tre probable ĝi ne estas. Same, kvankam oni povas konsideri certa, ke inteligentaj estuloj ekzistas en la universo, la grandaj distancoj en spaco kaj tempo kaŭzas, ke renkonti unu la alian la diversaj inteligentaj vivformoj preskaŭ certe ne povas.

– Cetere, aldonis Setälä, la artikolo en Giganteto estis verkita de mi.

Arvikolo

E-gazetaro

Kiel agrable estis kiel komencanto. Tiam la lingvo Esperanto estis tiel granda afero. Sed nun, kiel progresanto la afero Esperanto iom post iom malgrandiĝas. Tiajn pensojn mi havis leginte la revueton "Komencanto", numero 12. Ĝi estas periodaĵo "por komencantaj esperantistoj kaj komencantaj aŭtoroj". Estas mirinde, ke antaŭe oni ne havis tian periodaĵon. Ĉar ankaŭ komencanta periodo sur la vojo de esperantisto havas valoron. Eble la plej grandan valoron. Kaj el tiu fazo kiel komencanto ni plenkreskintoj ĉerpas fortojn ankaŭ nun. Spite al cinikaj momentoj, kiam nia afero ŝajnas esti el nenia valoro.

La revueto "Komencanto" estas forumo por verkemuloj en Esperanto, kaj ankaŭ por korespondemuloj kaj vortenigmuloj. Per ĝiaj 8 paĝoj la periodaĵo estas manipulebla de kaj veraj kaj eternaj komencantoj. Ĝenerala aspekto de la revueto estas inspiriga. Al instruistoj de nia lingvo venas nova rekomendaĵo, ĉar por komencantoj tro maloftaj esperantlingvaj periodaĵoj donas lokon. Bedaŭrinde.

"Komencanto" aperas 8-foje jare. Eldonkvanto estas 500. Ĝin redaktas Viktoro Kudrjavcev, RU-620041, Ekaterinburg, ab. k. 132, Rusio. Oni povas aboni "Komencanton" per 12 USD sendante la sumon al la UEA-konto *vkud-a* kaj informante la revuon pri la abono. Kaj fine citaĵo el la revuo "Komencanto". Jugajk Vladimir havas aforismon: "Ju pli multe ni ekscias pri la naturo, des pli malmulte de ĝi restas".

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

EAF:n www-sivujen käyttäjätilastoa

Matti Lahtinen on avannut uuden www-sivun, jolle on koottu tilastoa Suomen esperantoliiton www-sivujen käyntimääristä. Www-sivu päivittyy automaattisesti.

Ajalla 21.9 – 8.12.97 käyntejä EAF:n www-sivuilla oli yhteensä 648. Noin puolet, eli 268, kokonaiskävijämäärästä tyytyi syventymään pääsivun tietoihin. Sitten tulee käyttäjämäärältään vähäisempi, mutta sitäkin tiiviimpi joukko. Osoitteistoa tutki 75 kävijää. Esperantolehden sisällysluettelo luki 67 kävijää. Linkkejä maailmalle käytti 62 kävijää. Ja perustietoa esperantosta (Mitä esperanto on?) tutki 57 kävijää. Opiskelun pääsivu kiinnostasi 54 kävijää. Ja lopuksi käyttäjämäärältään pienimmät sivut: esperantonkielinen pääsivu (33) ja kalenteri (32).

EAF:n suomenkielisen pääsivun suosio on ymmärrettävä asia, siellähän tulee pakostakin poikenneeksi jatkaessaan

matkaa itseään kiinnostavaan kohteeseen. Osoitteiston ja linkkien suosio perustuu siihen että tämänkaltaisilta sivuilta etsitään juuri senkaltaista tietoa. Ainoa asia, joka minut yllätti tässä tilastossa oli Esperantolehden sähköisen version suosio. Toisaalta jokaisen lehden verkkoversiolle vakiintuu vuosien mittaan tietty käyttäjäkuntansa. Esperantonkielisen pääsivun sijoittuminen häntäpäähän osoittaa sen, ettei EAF:n sivuille ole osattu ulkomailta hakeutua. Me suomalaiset esperantistit kyllä tiedämme sivujen olemassaolosta. Koska yhteisömme ulkopuolella ei tiedoteta esperantonkielisistä www-sivusta suurelle yleisölle, ei kukaan niistä tiedä, vaikka kiinnostusta itse Esperantoon olisikin.

Matti Lahtisen tilasto löytyy osoitteesta: `<http://www.sci.fi/userbin/run/~matlah/stato_cgi.txt>`.

Aimo Rantanen

Seuraava numero ♦ Venonta Numero

Seuraava numero ilmestyy helmikuun alussa 1998. Jutut 15.1. mennessä Aimo Rantaselle, PL 2, 40801 Vaajakoski, puh. (014) 261 438. Venonta numero aperos en la komenco de februaro 1998. Sendu la artikolojn ĝis la 15-an de januaro al Aimo Rantanen, PL 2, FIN-40801 Vaajakoski, tel. (014) 261 438.